# NIA PONTO


Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jmgiaa@gmail.com)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €.
**KUTXABANK(BBK)-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**OKTOBRO/DECEMBRO 2017** **Nro. 113 (4/17)**





## El "día de Zamenhof" en el Grupo Esperantista de Bilbao.

Como ya es tradicional, también este año nos reuniremos en el Grupo para celebrar el "día internacional del Esperanto", ese 15 de diciembre en que nació L.L. Zamenhof.

Tras una breve charla sobre la historia del Grupo Esperantista de Bilbao, habrá un pequeño homenaje, con regalo, a los alumnos del curso de este año y, para terminar, nos reuniremos, como es habitual, alrededor de una mesa para dar buena cuenta de la comida y las bebidas aportadas por los participantes. Familiares y amigos son, naturalmente, bienvenidos.

**Día: Sábado 16 de Diciembre**.
**Hora: 19:30**. (Comenzaremos a esa hora. Se ruega puntualidad)



**LOKE ...**

## KRISTNASKA LOTERIO JAM AĈETEBLA.




La jam tradicia loterio kristnaska alvenas unu jaron plian. Ĉi-foje ni ludas pere de la numero 03.382.

Kiel kutime, ĉiu bileto, presita tute en Esperanto, kostas 5 eŭrojn, el kiuj, 1 eŭro restas kiel donaco al la E-Grupo de Bilbao; sekve, pere de unu bileto oni ludas 4 eŭrojn.

Kaj, ankaŭ kiel kutime, eblas aĉeti la biletojn pere de interreto. Por tio,

1. Enkontigu la monon en la kontonumero de la "Grupo Esperantista de Bilbao" (Ĝi troviĝas en la unua paĝo de tiu-ĉi revueto).
2. Sendu retmesaĝon al la adreso de la E-Grupo. (Ĝi ankaŭ troviĝas en la unua paĝo de tiu-ĉi revueto).
3. Ni sendos la biletojn, skanitaj, al via retadreso.
4. Se la biletoj estus premiitaj, ni enkontigus rekte la monon en vian konton.

**Último día de venta de lotería: sábado 16 de diciembre**

## E-STRATOJ EN BILBAO.

Ĉu vi pensas ke ne eblas trovi esperantajn vortojn inter la stratnomoj de Bilbao? Ne pensu tiel, ĉar sufiĉas rapidan rigardon por trovi kelkajn:

Ni komencu per la strato "ESPERANTO", en la kvartalo "Rekalde", la plej konata de la bilbaoaj esperantistoj, sed estas aliaj:
ARABA (Atentu!. Ne temas pri islamana strato), ARANE (certe ne temas pri bestet'), ARBIDEA (ĉu iu, kiu pensis pri arboj?), ARBOLANTXA (stranga arbo), FIKA (la plej seksema strato), Estrada de MALA (strato kiu kontraŭas ĉion), HENAO (strato, kie oni tinkturas harojn ruĝe), Maestro García RIVERO (malgraŭ la nomo, ne eblas vidi akvon sur ĝi), MARINA (ĉu mara inaĵo?), PRIM (ĉu omaĝo al matematikaĵ'?), JADO (tamen, en ĝi ne troviĝas juvelejoj), Placo JARO de Arana (stranga jaro, kiu ne enhavas 12 monatojn), RIPA (osta strato), RONDA (tamen, strato sufiĉe rekta).

## CUOTAS DEL AÑO 2017.

Si a la izquierda de estas líneas aparece una "X", es que **<u>te has olvidado de hacer el pago de la cuota de socio de este año</u>**. El número de cuenta está en la primera página de este "Nia Ponto" y las cuotas vigentes son:

Cuota normal: 60,00 € anuales. (5 € al mes)
Cuota familiar: 70,00 € anuales. (5,83 € al mes)

## NIA E-GRUPO EN INTERRETO.

Ne forgesu ke nia E-Grupo troveblas ankaŭ en fejsbuko ("Facebook"), sub la nomo "esperanto grupo Bilbao".

Kaj ke nia TTT-ejo estas https://sites.google.com/site/esperantobi/home.

Fine, nia retadreso: esperantobi@gmail.com

Kaj ni ne forgesu ankaŭ la senlacan laboron de nia Prezidanto, Paco, dank' al kiu nia Grupo ekzistas en interreto.

## VENONTAJ E-ARANĜOJ.

**27 dec. 2107-03 jan. 2018**. 16-a Novjara Renkontiĝo. En Saarbrücken (Germanio), tuj apud Francio kaj Svislando. Informa paĝo kun aliĝilo: http://www.esperantoland.org/nr/partoprenantoj_nr16.php

**30 mar-06 apr. 2018**. 11-a MEZORIENTA ESPERANTO-KUNVENO. MARAKEŜO (MAROKO). Aliĝoj kaj informoj ĉe: mezorienta.kunveno@esperanto.org aŭ ĉe http://uea.org/vikio/La_dekunua_Mezorienta_Kunveno_en_Marakesho,_Maroko
Ĝenerala temo: Esperanto en Norda Afriko

**20-22 jul. 2018**. 77-a kongreso de Hispana E-Federacio. Madrido. Interesa programo kaj malmultekostaj tranoktejoj.

**21 – 28 jul. 2018.** 51-a Kongreso de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) - en Madrido. Kongresa temo "La kultura heredaĵo de Esperanto". El la programo: Interkona frandvespero, instruista trejnado, E-kursoj por komencantoj kaj komencintoj, prelegoj kaj atelieroj de konferencanoj, lingva festivalo, simpozio pri la konferenca temo, konferenca bankedo, distraj vesperoj, literatura kafejo, ekskursoj. Post la fermo, karavana transiro al UK en Lisbono.

**28 jul-04 aŭg. 2018**. 103-a Universala kongreso en Lisbono (Portugalio).

**04-11 aŭg. 2018**. Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO, en Badajoz. Ne nur por gejunuloj.

**05-12 aŭg. 2018**. SAT-kongreso - en Kragujevac, Serbio. Ĉeftemo: Esperanto kaj transnacia komunikado en la inform-teknologia epoko. Riĉa faka, kultura kaj turisma programo. Ĉefprizorgantoj: Saša PILIPOVIĆ kaj Radojica PETROVIĆ

**Kompleta kalendaro pri E-eventoj, okazintaj kaj okazontaj, en:**
**http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm**

**H.E.F.**

## KREITA LA LKK DE LA VENONTJARAJ KONGRESOJ EN MADRIDO.

Ni jam komencis la preparlaborojn de la kongresoj kiuj okazos en Madrido en julio 2018, nome la 77a Hispana Kongreso de Esperanto (20-22 de julio) kaj la kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (21-28-a de julio)

Dum la komenco de septembro venis al Madrido la respondeculo pri kongresoj de ILEI, Radojica Petrović, kiu kunvenis kun madridaj esperantistoj. Kiel unua resulto, oni kreis la Lokan Kongresan Komitaton (LKK):

* Prezidanto: Manuel Parra
* Sekretario: Santos Olan
* Kasisto: Ricardo Biurrun
* Voĉdonanto (programo): Felix Jimenez
* Voĉdonanto (organizado, gastigado): Agueda Biurrun
* Voĉdonanto (informado, instituciaj rilatoj): Jose Antonio del Barrio.

Oni vizitis ankaŭ instalaĵojn, gastejojn, kaj oni interparolis kun respondeculo de la institucio pri kongresoj de la madrida urbestraro. Ankaŭ okazis kunvenoj kun aliaj aktivuloj i.a. por plani la junularan programon de la kongresoj.

*(“Nia Voĉo”. Organo de Madrida E-Liceo. Oktobro 2017)*

## ĈU ESPERANTISTO EN LA “PLANETA-PREMIO”?

Inter la dek finalistoj al Planeta-premio estas *Mujeres rotas.* La aŭtoro uzas la kromnomon «Voli estas povi». Do, eble, li estas esperantisto, eĉ kunlistano (aŭ ŝi estas esperantistino, kunlistanino). Mi tute ne scias.
Jen ligilo:
http://www.elperiodico.com/es/ocio-y-cultura/20171015/premio-planeta-domingo-novelas-finalistas-6353223

*(Javier Guerrero. 15/10/2017)*

## PREMIO ADA SIKORSKA FIGHIERA 2017 AL ANA MANERO.

Ana Manero ricevis la premion "Ada Sikorska Fighiera 2017" en la 25a ISKT (Internacia Semajno de Kulturo kaj Turismo), okazinta en Tossa de Mar.

https://youtu.be/ohJWbiE8XYE

*("Scioj" sciosfero@gmail.com. 03/11/2017)*

## KOMENCIĜAS KURSO EN LINGVA OFICIALA LERNEJO.

La 31an de oktobro estis prezentita en Fuenlabrada (Madrido) la nova kurso de Esperanto, kiu ĉijare okazos en la Oficiala Lingvolernejo de tiu urbo. Juan del Castillo prezentis la lingvon kaj la kurson.Ĉeestis dudeko da homoj, el kiuj 13 aliĝis.

*(“Nia Voĉo”, órgano de Madrida E-Liceo. Nov. 2017)*

## MADRIDANOJ EN VARSOVIO.

Du madridanoj, Miguel Fernandez kaj Ana Manero, partoprenis dum la 14-a kaj 15-a de oktobro en la Varsovia Kultura kaj Lingva Festivalo, kiun oni organizis en tiu pola urbo memore al la centjara datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof.

En la foto, Miguel Fernandez deklamas, apud la tombo de D-ro. Zamenhof kaj honore al li, la elegion verkitan de la hispana poeto Miguel Hernandez al la morto de lia amiko Ramon Sije.




## NOVA ELDONO DE "POETO DE L' POPOLO".

Dum tiu ĉi jaro oni kunmemoras la 75-an datrevenon de la morto de la granda hispana poeto Miguel Hernández. Liaj verkoj estis tradukitaj al Esperanto de lia preskaŭ samnomulo Miguel Fernández, antaŭ 30 jaroj, kun la titolo "Miguel Hernandez, poeto de l' popolo".

Ĉijare, okaze de tiu kunmemoro, kaj profitante la okazigon de Kongreso pri li en novembro en la provinco Alikanto, Hispana Esperanto-Federacio publikigos duan eldonon de tiu verko, korektitan kaj ampleksigitan. La verkon prezentos en la urbo Alikanto, la 16an de novembro je la 6-a horo, la prezidanto de HEF, Jose A. del Barrio, kaj la tradukisto, Miguel Fernandez.

*("Nia Voĉo", órgano de Madrida E-Liceo. Nov. 2017)*

LA "GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO" TUTKORE DEZIRAS, AL LA TUTA HOMARO, SUKCESAN JARON 2018-AN.

## TRA LA MONDO ...

# ESPERANTISTINO, KANDIDATO POR ŜTATPREZIDANTO DE RESPUBLIKO SLOVENIO.



Esperantistino Ljudmila Novak el Slovenio estas unu el la kandidatoj por la nova ŝtatprezidanto de Slovenio. La balotoj okazos la 22-an de oktobro.

Ljudmila Novak estis en la mandato 2005-2008 membro de Eŭropa Parlamento kiam ŝi sufiĉe multe engaĝiĝis por Esperanto, Ŝi ebligis ke okazis afiŝekspozicio pri Esperanto en la ejoj de Eŭropa Parlamento kaj postulis ke oni traktu du ŝiajn proponojn pri Esperanto en la Komitato por kulturo de la Eŭropa Parlamento.

Ŝi estis aŭspicianto de la kongreso de EEU en Maribor en 2007 kaj mem partoprenis en la kongreso same kiel en kelkaj aranĝoj en Bruselo organizitaj de EEU. Ŝi iĝis honora membro de EEU.

Ŝi lernis E-on en gimnazio en Maribor kaj partoprenis en 2 TEJO-kongresoj en sia juneco. Ŝi nun estas membro de la parlamento de Slovenio kaj prezidantino de la partio Nova Slovenija.

*(Zlatko Tišljar. "Eŭropa Bulteno". Nro. 173. Septembro 2017)*

# ĈU EŬROPO VERE ĈESAS AMI LA ANGLAN?




Jean-Claude Juncker asertis, ke la angla perdas sian gravecon en Eŭropo - ĉu li pravas?. "Malrapide sed certe la angla perdas gravecon en Eŭropo," la ĉefo de EU, Jean-Claude Juncker, diris intjare.

Iuj povus vidi liajn komentojn kiel provo akiri la superecon en la intertraktadoj de Briteliro. Aliaj povus aserti, ke li pravas - kiam Britio fine forlasos Eŭropan Union nur Malto kaj Irlando havos la anglan kiel unu el iliaj oficialaj lingvoj.

La statistikoj tamen pentras alian bildon. Ciferoj publikigitaj por la Eŭropa tago de lingvoj, malkaŝas ke 83.5% de EU-bazlernejanoj lernadis la lingvon de Ŝekspiro en 2015, la plej lasta periodo por kiu datumoj haveblas.La angla eĉ fariĝis pli populara. La proporcio de junuloj kiuj lernas la lingvon pligrandiĝis je 6% en la du jaroj antaŭ 2015. Sed la britelira referendumo okazis junie 2016!

Procentoj de elementlernejanoj kiuj lernas la anglan: (2015)

Svedio:87,9; Finnlando 68,6; Estonio 77,1; Latvio 87,8; Litovio 73,3; Pollando 97,6; Germanio 72,7; Nederlando 42,9; Belgio 36,7; Luksemburgo 100; Aŭstrio 100; Ĉehio 73,6; Slovakio 85,9; Rumanio 98,3; Hungario 59,6; Bulgario 82,9; Francio 99,2; Slovenio 49,8; Kroatio 99,9; Italio 98,6; Portugalio 35,4; Hispanio 99,4; Grekio 79,4.

*(Chris Harris-Tradukis Seán ÓRiain. "Eŭropa Bulteno". Nro. 173. Septembro 2017)*

# PLENA ILUSTRITA VORTARO (PIV) LIBERE KONSULTEBLA.

PIV (Plena Ilustrita Vortaro) estas je nia dispono en la reto kaj libere. Se mi bone memoras, antaŭ iom da tempo, eblis konsulti sed oni devis esti registrita. Sed nun mi aliris, kaj ŝajne oni liberigis la aliron kaj konsulton. DANKON al kiuj ebligis tion!

Jen la ttt-pagxo por aliri al PIV: vortaro.net

*(Lorenzo Noguero. 13/10/2017)*

# UEA. Stato de la membraro.

Mi sendas al vi resumon pri la membronombro, laŭ la ciferoj disponeblaj hieraŭ, la 17-an de oktobro 2017, pri la jarkotizantaj membroj kun komparo al la pasintjaraj ciferoj samtage, interkrampe.

Unue mi komencu per la ciferoj, kiuj ne montris signifan ŝanĝon: la nombro de la dumvivaj membroj estas stabila, ni havas nuntempe 955 (enkalkulante la honorajn kategoriojn).

En la kampo de jarkotizantaj membroj, okazis pli grandaj ŝanĝoj. Tie, en la kategorio kun papera revuo Esperanto, nome en la kategorio Membro-Abonanto, estis falo de preskaŭ 100, al 1297 (1386) membroj. Kresko, sed ne sufiĉa por finance kompensi, videblas en la kategorioj Membro kun Jarlibro 1665 (1522) kaj Membro kun Gvidlibro 438 (388). Sume, nuntempe ni havas entute 4355 (4223) membrojn, el kiuj ĉi-jare membriĝon ricevas danke al Fondaĵo Canuto 368 (306) personoj.

Kvankam la nombroj montras relativan stabilecon, ĉi-jare ni havas 929 novajn membrojn kaj 908 personoj ne renovigis ĝis nun sian membrecon. Tia fluktuo parte estas kaŭzata de la membriĝoj por partopreni en la UK, tion montras ke el la novaj membroj 426 personoj (46 %) aliĝis al UK-2017, kaj el la nerealiĝintaj membroj 309 (34 %) estis aliĝintaj al UK-2016.

Por vidi la situacion en specifaj landoj, mi sendas al vi kune kun mia mesaĝo bildon, kiu donas informojn pri la ŝanĝoj en tiuj 10 landoj, en kiuj nia Asocio havas plej multe da membroj. (dua kolumno: lando, tria kolumno: nuna stato, kvara kolumno: stato en la pasinta jaro, kvina kolumno: diferenco inter la pasinta jaro kaj la nuna jaro)

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1 | Germanio | 433 | 471 | -38 |
| 2 | Francio | 410 | 418 | -8 |
| 3 | Japanio | 354 | 308 | +46 |
| 4 | Brazilo | 283 | 284 | -1 |
| 5 | Usono | 257 | 242 | +15 |
| 6 | Korea Resp. | 217 | 66 | +151 |
| 7 | Nederlando | 166 | 192 | -26 |
| 8 | Italio | 135 | 160 | -25 |
| 9 | Hispanio | 133 | 123 | +10 |
| 10 | Belgio | 113 | 120 | -7 |

*(Veronika Poór, Ĝenerala Direktoro de UEA. 17/10/2107)*

## Premio pri Homaj Rajtoj al Itala Esperanto-Federacio.

Itala Esperanto-Federacio ĵus ricevis la premion "Itala premio pro homaj rajtoj 2017" fare de asocio de liberaj ĵurnalistoj kaj de la itala Sekcio de Amnesty International.

La premio konsistanta el diplomo kaj pentraĵo estis transdonita al la prezidantino de IEF, Michela Lipari, dum ceremonio en Romo.

La motivigo de la premio parolas pri la agado de IEF en la kampoj de interkompreniĝo inter popoloj laŭ la idealoj de Esperanto, de helpo al viktimoj de militoj kaj katastrofoj en la mondo, de partopreno en la agado Oriento-Okcidento de Unesko.

*(Renato Corsetti. 17/10/2017)*

## Malnovaj E-periodaĵoj legeblaj-kaj traserĉeblaj- en la reto.

La kompletaj tekstoj de multaj jarkolektoj de pli ol 70 Esperanto-periodaĵoj, ekzemple tiuj de la revuo Esperanto de 1905 ĝis 1946, estas nun plene traserĉeblaj en la retejo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Bernhard Tuider, estro de la kolekto en Esperanto-Muzeo en Vieno respondas la demandojn de Libera Folio.

La retan adreson vi trovas en la artikolo
ĉe: http://www.liberafolio.org/2017/10/02/historiaj-periodajoj-nun-rete-traserceblaj/

*(Ret-Info / Lingvo-Studio, LS - http://www.eventoj.hu. 04/10/2017)*

## UEA ŝanĝas ĝeneralan direktoron.



La Centra Oficejo de UEA ekde la jarŝanĝo iĝos malcentra. La nova ĝenerala direktoro de la asocio, Martin Schäffer, ne laboros en la oficejo. La ĉefa oficisto de la asocio grandparte loĝos en alia kontinento.

La nuna ĝenerala direktoro de UEA, Veronika Poór, forlasos sian postenon en la fino de 2017. Tion anoncis la estraro de UEA en gazetara komuniko dissendita la 1-an de novembro. La decidon la estraro laŭ la komuniko faris la 31-an de oktobro – en la sama tago, kiam *Libera Folio* raportis pri kunlaboraj problemoj en la Centra Oficejo.

Nova ĝenerala direktoro laŭ la decido de la estraro iĝos Martin Schäffer, kiu nun estas estrarano kaj ĝenerala sekretario de la asocio.

*("Libera Folio". 01/11/2017)*

## UEA investis 10.000 eŭrojn en Amikumu.

La poŝtelefona programo Amikumu iĝis multlingva, ricevis premion kaj trovis novajn investantojn. Unu el ili estas UEA, kiu aĉetis akciojn de Amikumu por 10.000 eŭroj.

Amikumu estas poŝtelefona apo (programo), per kiu oni povas trovi samlingvanojn kiuj troviĝas proksime. Ĝi estis lanĉita por esperantistoj en aprilo 2017 kaj rapide iĝis tre populara. Ĵus aperis nova versio, kiu interalie signifas ke ne nur eblos serĉi parolantojn de multaj lingvoj, sed ankaŭ la programo mem iĝas multlingva.

*("Libera Folio". 27/10/2017)*